

BELGA ESPERANTO-FEDERACIO



Sonorilo

54-a jaro - n° 2

Marto 1962

Demandu provveturon per
la nova

Ford Anglia

LA PLEJ BRILA EN SIA KATEGORIO



rekta distribuanto por Brugge kaj
ĉirkaŭaĵoj

GARAGE CANADA

GULDEN VLIESLAAN 68 BRUGGE

TEL. 34611

Sonorilo

oficiala dumonata bulteno de B.E.F.

Redakcio : JAUMOTTE MAURICE
ROOSE FERNAND, sint-klaradreef 59, BRUGGE tel. (050) 319.81
MAERTENS GRÉGOIRE

Kunlaborantoj al regulaj rubrikoj :

DR. POL DENOËL
BRUNO DENOËL
COUWENBERG F.
DE CUYPER GEORGES
DE MARRÉ LUC
ISERENTANT ROGER
POUPEYE CHARLES



ASOCIO SEN PROFITA CELO
DE BRUYNLAAN 44, WILRIJK tel. (03) 377758

honora prezidanto

kempeneers paul

honora vicprezidanto

sielens henri

prezidantoj

debrouwere gerard
jaumotte maurice

Ĝenerala sekretario

de marré luc, groenendaallaan 232, antwerpen tel. (03) 411912

sekretario por la flandralingva regiono

maertens grégoire, prins leopoldstr 51, st-kruis tel. (050) 34935

sekretario por la franclingva regiono

de cuyper georges, 44 rue du temple, courcelles (hainaut)

kasistinoj

terryn juliette, raapstraat 72, gent
van herck-huysmans, provizoro :
de bruyllaan 44 wilrijk

representanto de universala esperanto-asocio

couwenberg f., koninginnelaan 14, blankenberge
p.k. nr 416135

poŝtkontoj de B.E.F. :

de la antaŭa R.B.L.E. : 1337.67 wilrijk

flandra ligo : 2321.50 gent

NIA REVUO

Antaŭ sesdek jaroj, "Belga Sonorilo" portis sur sia unua paĝo bildon de forta sonorilego, portita per pezaj traboj, kies lignon la artisto zorge pentris, tiel ke eĉ ne-specialisto povis ekscii pri kia ligno kaj pri kia kvalito temis.

Nun aperis la nova "Sonorilo" kaj, pro la nomo ne tuj komprenebla por eksterstarantoj, ankaŭ ni pensis ke eta desegnaĵo pli multon diras ol longaj vortoj. Sed en nia desegnaĵo, oni ne povas rekoni la lignon... La ideoj pri arte evoluis kaj la artisto kontentiĝis sugesti nur la formon de la sonorilo kaj de ĝiaj teniloj... Sed, entute, la kovrilpaĝo aspektas bele... La impresoj estas moderna kaj juna, kiel volas esti nia ne nur reunuiĝinta, sed rejuniganta movado.

Ni volas tie ĉi speciale danki S-ron Grég. Maertens, nian surlokan sekretarion, kiu daŭrigis flegi la rilatojn kun la presisto, en kies laborejo li sentas sin hejme. Kaj se iuj povis atentigi lin pri kelkaj prezeraroj kaj kelkaj malperfektaĵoj, multaj kontraŭe volas gratuli lin pro la, — precipe por tiu ĉi unua numero, — farita laboro.

La subskribinto volas substreki ke speciale feliĉigis lin la fakto ke, sur la unua paĝo, krom la nomo de nia Federacio kaj la titolo de la revuo, ankaŭ aperis, kiel tempindikilo: *5^a jaro — N° 1*". Tiu indiko, pri kiu la subskribinto ne respondacas, estas pruvo ke, — en la spirito de ĉiuj gvidantoj de nia Federacio —, "Sonorilo" estas la daŭriganto de la du revuoj, kiuj ĝis nun plenumis ambaŭ sian rolon en la vivo de nia lando; same kiel nia "Federacio" volas daŭrigi la laboron de multaj samideanoj niaj, kiuj, jam dum sesdek jaroj, laboris por la sama Idealo.

La nura diferenco estas, ke la du fratoj, kiuj plenumis ĝis nun siajn taskojn en propra laborejo, nun kunigis siajn fortojn por pli bone, pli taŭge labori estonte... Multaj entreprenoj fiaskis en la daŭro de la tempo, ankaŭ sur la Esperanta kampo... Sed ne jam estis ekzemplo de kuniĝo de fortoj, kiu ne alportis bonon al ambaŭ reunuiĝintoj.

Ni do fidu en nia estonteco... Sed nia fido ne estu blinda... Nur la fakto de la reunuigo nenion solvas... Estas la homoj, kiuj reunuiĝis, kiuj kune kapablos ion fari... se ili volas... se ili havas la forton daŭrigi la evoluon, kiun ili kontribuis krei.

La jaro 1961 estis jaro de intertraktadoj. La jaro 1962 estas la jaro de realigo de unuigo... Sed, — en septembro kiam komenciĝos la nova kampanjo por niaj kursoj, ĉie en la lando —, *ni devos esti pretaj* por fari grandan propaĝandon, pli grandan ol iam antaŭe, por ke, — denove kaj unufoje pli, — oni re-parolu pri Esperanto, ne kiel oni daŭre parolas pri ĝi... kun bonvolo kaj simpatio, sed sen intereso; sed vere kiel pri io nova, kio povas, ankoraŭ ĉiam, alporti la solvon al problemoj, nun pli akraj ol iam antaŭe.

Al tiu tasko mi alvokas vin, ek de hodiaŭ.

Maur. JAUMOTTE.

la du dometoj

Ĉina apologo

Du fratoj vivis en unu sama dometo, en kiu ili ekspluatis komunan butikon. La pli aĝa havis edzinon, la pli juna estis ankoraŭ fraŭlo kaj paco regis inter ĉiuj tri. Ĝis kiam, la pli juna enamiĝis, baldaŭ edziĝis, kaj... la paco rompiĝis. Li postulis sian parton el la gepatra heredaĵo kaj, per tiu kapitalo, konstruis tutapude de la frata dometo, novan dometon, en kiu li enloĝis kun sia juna edzino kaj en kiu, ho ve, li malfermis ankaŭ butikon por tie vendi la samajn varojn kiel lia pliaĝa frato.

Konkurenco malamikiĝis ilin. Unu spionis la alian, ĵaluze klopodis kapti la klientojn de la rivalo kaj... multaj jaroj forpasis tiel en malĝojiga malamikeco. Dum siaj infanjaroj, la idoj de ambaŭ paroj interbataladis preskaŭ ĉiutage; plenkreskaj, ili imitis siajn gepatrojn, ignorante siajn gekuzojn arogante kaj obstine.

Iun tagon tamen, okazis en la urbo tre granda festo por honorigi la memoron de la patro de ambaŭ fratoj, de tiu patro, kies heroo kondukto dum la lasta milito, evitis plej kruelan sorton al la tuta urbo. La du fratoj estis evidente invititaj kaj iris ambaŭ al la festloko, ĉiu laŭ diversaj stratoj. Tamen, dum la tuta ceremonio, ili estis lokitaj unu apud la alia kaj ricevis kune la elokventajn laŭdegojn de la aŭtoritatuloj, vere direktitajn al ilia patro, sed kiuj tamen forte tuŝis la koron de ambaŭ. Honortrinkaĵo estis verŝata: ili ricevis la varmajn gratulojn de ĉiuj ĉeestantoj kaj, en la ĝenerala entuziasmo kaj plenkontenteco, ili senpripense gratulis sin reciproke!

Dum sekundo, ili fikse rigardis unu la alian ne sciante ĉu koleri, ĉu ridi. Sed dua sekundo ne finiĝis, ke jam ili enbrakiĝis kun ploroj en la okuloj. La festo plidaŭris kun ankoraŭ pli da ĝojo, pro la reamikiĝo de la eksmalamikaj fratoj.

Malfrue en la nokto la du fratoj rehejmiĝis, brakon sub brako, kaj antaŭ ol eniri siajn respektivajn dometojn, ili ĵuris ke ek de la morgaŭa tago ili ĉesigos la konkurencan duecon inter si.

Ĉiu el ili bezonis ankoraŭ multe da obstino por persvadi kaj akordigi siajn samloĝantojn, sed post longdaŭraj interkonsiliĝoj, la plano estis preta kaj unuanime akceptita.

La plenumo de tiu plano daŭris ankoraŭ kelkajn monatojn kaj kunportis neeviteblajn malagrablajojn. Ili efektive malkonstruis la du apudajn dometojn, devis loĝi intertempe tre malkomforte en malgrandaj barakoj kaj spertis kompreneblan malaltiĝon de la komercaj enspezoj. Sed kiam la tuta tereno estis ebena, ili konstruis belan komunan domon, en kiu poste ĉiuj ricevis oportunan loĝejon kaj en kiu ili tiam ekspluatis komune nur unu grandan modernan magazemon kun nomŝildo: "En la du dometoj".

La komerco rimarkinde floris kaj la du klanoj vivis feliĉaj kaj prosperaj en unu granda familio.

Ŝa Pu Pej.

Firma Van Iseghem & Verstraeten,

P.V.B.A.

ST BERNARDSE STEENWEG, 631 HOBOKEN

VITRALOJ - speguloj - „SECURIT“ VITRO
KOLORIGITAJ VITROJ
ALUMINIAJ SENMASTIKAJ STANGOJ POR
KUPOLOJ

VITRO-CEMENTO POR TUTVITRA-KONSTRUJAŬOJ
MASTIKO

telefono 37.88.20

Ĉu baldaŭ „Lamenhof-strato“ en Lieĝo?

D-ro Denoël, prezidanto de la Lieĝa Grupo, sciigas nin, ke li ĵus ricevis personan leteron de skabeno de urbo Lieĝo, anoncanta firman proponon, doni al nova strato la nomon „rue du Docteur Lamenhof.“

La nova strato situas inter „Boulevard Sainte Beuve“ kaj strato „du Calvaire.“

La propono jam aprobita de speciala urba komisiono, troviĝas nun en du aliaj teknikaj oficoj. Poste ĝi estos ekzamenata de la urba Konsilantaro, por definitiva aprobo.

Verreries et Miroiterie DESMECHT & C^o

LA LOUVIERE

S. P. R. L.

Tel n-roj 223.01 - 225.37

Du esperantaj markoj:

TABULO, por lernejtabuloj; KATOKULO, por signalvitroj.

SERĈI LA HEJMON

Okaze de la morto de

E. Hemingway

“Meze en la vivo, ni estas en la morto”. Tiu parolo de Notker de St. Gallen povintus esti la devizo de E. Hemingway, la granda Amerika verkisto kiu mortis komence de julio. Ĉar, lia vivo estis daŭra konfrontado je la morto, la morto kiu estas konstante revenanta temo en liaj libroj. Lia propra morto, en ne tute klaraj cirkonstancoj, estas simbola por lia vivo; li foriris de ni kun nerespondita demando.

La vivo de Hemingway estis serĉo al la limitoj de la hom-estado. Ĉiam li serĉis situaciojn en kiuj la plej profundaj realoj de la homa ekzistado devis iĝi pli klaraj ol en la ĉiutaga vivo: militoj, ĉasaventuroj, montgrimpadoj. Ofte li metis sin en vivdanĝero. Ĉu ne signifoplene ke jam dufoje antaŭ ol venis lia vivofino, lia morto estis anoncata en la monda gazetaro? Dufoje oni kredis ke li pereis en aeroplanakcidento en Afriko; dufoje li eskapis je preskaŭ mirakla maniero. Sed longe antaŭe jam estis komencinta lia renkontiĝo kun la morto. 19 jaraĝa libervolulo, batalante sur la Itala fronto, li estis trafata apud la Piave, de Aŭstria grenado. Liaj tri Italaj kamaradoj baldaŭ mortis. Hemingway resaniĝis malrapide; sole el lia dekstra kruro oni for-

prenis 247 grenaderojn. Pli malfrue li diris foje: “en tiu tempo mi mortis”.

Oni devas kompreni tiun parolon tre serioza. La temo morto ne plu lasos lin trankvila en lia tuta vivo. Dek jarojn poste, lia patro, kuracisto, Clarence Hemingway sinmortigis; teruriga vivosperto por la junulo! Pli poste H. luktis en la Hispana interna milito. Dum la dua mondmilito li estis militraportanto en Francujo. Liaj ĉasaventuroj, lia ŝatego de la bovobataloj: en ĉio tio evidentiĝas lia malpaca okupiĝo kun la mistero de la morto. Unu de liaj verkoj havas titolon: “Merto en la Posttagmezo”. Ĝi enhavas priskribojn de bovobataloj, variigitaj per konsideroj pri multaj temoj sed precipe pri la morto. Kio estas malantaŭ la limito? La homo vivas inter du abismoj kaj la vivado estas daŭra mortado, estas insidati de miloj da danĝeroj, kiel la granda fiŝo, kiun la maljuna fiŝisto Di-Maggio kaptis post ega luktado, estas formangata de miloj da balenoj tiel ke li povas alterigi nur la ostaron. (La maljuna viro kaj la maro).

La mondo mortigas la plej bonajn, la plej fajnspiritajn kaj la plej kuraĝajn. Kaj se ci ne apartenas al tiuj, tiam vi povas esti certa ke ĝi tamen ankaŭ vin mortigos: nur, ĝi tiam ne eksterordinare rapidos. Tion skribas Hemingway. Liajn romanheroojn trafas tiu nepardonema sorto.

Katarina, en “Adiaŭo al la armiloj”, mortas duregan mer-ton en la akuŝlito. Robert Jordan, en “Por kiu sonoras la mortsonorilo”, postrestinta sola kaj vundita por protekti ponton kontraŭ alvenanta malamiko, iras al neevitebla morto. Ĉu tiu mortado havas sen-

con? En "Neĝo sur la Kilimanĝaro" Hemingway priskribas kiel, ne malproksime de la okcidenta pinto nomita la "Hejmo de Dio", la sekiĝinta kaj frostita ostaro de leopardo estas trovita. Neniu povis klarigi kion leopardo serĉis en tiu altmontaro. Hemingway diras: la leopardo serĉis la hejmon de Dio, la senmortecon. Kaj okaze de tiu enigma klopodo ĝi trovis la morton. Oni povas interpreti tiujn parolojn diversmaniere. Sed certe Hemingway ne celis pian legendon. Verŝajne ankaŭ ne simbolan precipiton de metafizika certeco. Pli verŝajne ĝi estas la klopodo por envortigi fortan, kvankam nedifineblan sperton: la homo vivas renkonten al la morto; sed li ne volas rezignacii en tiu sorto kaj tial serĉas kio estas malantaŭ la morto. Ĉu do estas io post la morto? Hemingway ne akceptas la respondon de la Kristaneco, sed ankaŭ ne tiun de tiuj laŭ kiuj la morto estas la absoluta fino. Li ne scias. Li scias nur unu aferon: la problemo ĉu la vivo havas sencon estas definitive ligita al la problemo de la esenco de la morto.

En civilizacio kiu klopodas for-

gesi la morton — nenie pli ol en la patrujo de H. mem, kie beletaj tombejoj minimigas la morton, kie estas ĵurnaloj kiuj pro principo ne presas la vortojn morto kaj morti— ĝi estas la grava signifo de H. ke li konfrontadis siajn legantojn kun la enigmo de la morto. Jen la nepardonema klifo sur kiu malsukcesas ĉiuj suprajecaj vivofilozofioj inkluzive la ĝuema okcidenta ateismo kaj la utopia marksista materialismo. Fronte al tiu realaĵo la junaj Sovjet-studentoj faras demandojn kiujn la oficiala filozofio ne kapablas respondi. "La mortlicto de sinjoro Renan estos tre interesa" skribis Barrès. Ĝi estis malmola kaj kruela parolo sed ĝi ne estis sen enhavo! Kion faras la liberpensulo, la aŭtonoma homo antaŭ la morto? Ĝi estas demando kiun multaj personoj faras denove al si mem; demando kiu povas ŝanĝi ilian vivon.

La vivoverko de H. estas ke li klare formulis tiun demandon. Li ne povis mem respondi al ĝi. Nun ĝi estas respondi por li. Lia Kreinto estu indulga por li ĉar li ne volis forkuri de tiu demando.

J.M.M. De Valk.

Noto de la Redakcio: Tiun-ĉi tre interesan artikolon ni trovis en la Nederlanda revuo „PLEIN“ (=Teren) kie kunlaboras katolikoj kaj protestantoj sub gvidado de konata Patro Jelsma.

(sekvo de p. 23)

- (5) spertaj: bedrevene — expérimenté, expert
 (6) nacilingve: in de nationale taal — en langue nationale
 (7) titolo: titel — titre
 (8) helpema: hulpvaardig — serviable, secourable
 (9) dialoganto: gesprekspartner — interlocuteur
 (10) sinteno: houding — attitude
 (11) kukolo: koekoek — coucou
 (12) flugilhavanta: gevleugeld — ailé

por la komencantoj

SERVO PER AMIKECO

Antaŭ *nelonge*, (1) mia atento estis kaptata de stranga etiketo ĉe fenestro de parkita aŭtomobilo. Sur ĝi estis legebla en Esperanto: "SERVO PER AMIKECO—I.P.A.". Tiu bele presita teksto ĉirkaŭis desegnititan terglobon.

La aŭtomobilo staris antaŭ privata domo. Kun *scivolemo* (2) mi frapis ĉe la *enirpordo* (3). Iu juna sinjoro malfermis.

- Pardonu min, mi diris, sed kion signifas la etiketo sur via veturilo?
- Servo per Amikeco? li respondis (kaj li prononcis laŭ franca maniero "amikeko"). Ĝi estas la devizo de mia asocio: Internacia Polica Asocio, *kies komencliteroj* (4) estas I.P.A.
- Ĉu vi scias, ke ĝi estas en Esperanto, ĉu vi mem estas esperantisto?
- Ĝi ja estas en Esperanto, sed mi ne konas la lingvon, mi ne estas esperantisto.
- Sed la Asocio?
- Ĝi kunigas policistojn el diversaj landoj, kiuj somere vojaĝas de unu regiono al alia, aŭ kiuj grupe vizitas sin reciproke. Ni helpas nin unu la alian.

"Ni ne studis Esperanton — li aldonis — ĉar mankas al ni la tempo. Dum niaj kunvenoj aŭ bankedoj la plej *spertaj* (5) inter ni helpas kiel interpretistoj. Ni devas *nacilingve* (6) kanti."

- Sed kial la devizo en Esperanto?
- Ni devis havi unu *titolon* (7) kaj unu devizon. Pro la internacia karaktero de nia ligo, ni ne volis uzi iun nacian lingvon, kaj ni uzis la internacian lingvon.
- Sed ĉu via celo, la *helpema* (8) servado, ne estus pli kompleta se la renkontoj, la komunaj manĝadoj, la korespondado, la distraĵoj, okazus en unu komuna lingvo?

Mia *dialoganto* (9) rigardis min senparole kaj post kelka tempo respondis: "eble". Espereble tiuj "servantoj per amikeco" lernos nian lingvon...

Ĝis tiam, ĉu vi ne opinios, kiel mi, ke almenaŭ stranga estas ilia *sinteno* (10)?

"*Kukolo*" (11) estas Esperanto vorto por birdo, kiu sidas en la nesto de aliaj *flugilhavantaj* bestoj...

- (1) antaŭ *nelonge*: tot voor kort — il y a peu de temps
- (2) *scivolemo* (*sci-vol-em-o*): nieuwsgierigheid — curiosité
- (3) *enirpordo* (*en-ir-pordo*): ingangseur — porte d'entrée
- (4) *kies komencliteroj*: waarvan de beginletters — dont les lettres initiales

RESTADO EN ESPERANTUJO

Ĉu vi jam aŭdis aŭ legis pri Primoŝten? Pasintan jaron, dum monato Aŭgusto, mi vojaĝis al Jugoslavio kaj restadis du semajnojn en bela somerumejo, nomita "Esperantujo". Ĝi situas apud Primoŝten, ne longe de Ŝibenik, ĉe la adriatika marbordo.

La junaj esperantistaj astronomoj de Zagreb havis la bonŝancon, ricevi altan stipendion de sia registaro, por organizi internacian ferilon ĉe la Adriatiko.

Ili havis duan bonŝancon, ke ili malkovris ravan duoninsulon, ankoraŭ dezertan, kiu plenumas ĉiujn kondiĉojn por perfekta restado. Pina arbareto kovras ĝin kaj donas ombron al tiu, kiu timas la intensan sunon. Sed ĝi donas alian protekton kontraŭ la varmeo: larĝa golfo ebligas komfortan banadon. Pasintan someron estis konstruataj sur la supro de la duoninsulo la instalaĵoj necesaj al civilizita vivo: restoracio, kunvenejo, observejo, kiuj nun verŝajne estas finkonstruitaj. Tranoktejoj estis eblaj ĉu en tendoj, ĉu en la domoj de Primoŝten.

Kvankam ĉio estis nur komenca kaj provizora, multaj junaj esperantistoj kunvivis dum la tuta somero. Mi havis okazon, longe konversacii kun samideanoj venintaj el Italujo, Nederlando, Aŭstrio, Germanujo, kaj ĉefe kun la entuziasmaj Zagrebaj gejunuloj. Ĉiuvespere ni amasiĝis ĉe la teleskopo por observi la Lunon, Jupiteron kun ĝiaj satelitoj kaj la ringon de Saturno.

Sen la komuna lingvo "Esperanto" estus neeble, pasiĝi tiel agrablajn feriojn. Oni tuj forgesas, ke oni vivas en alia lando kun fremdaj gastoj!

Ĉu vi ne ŝatus travivi tian mirindan eksperimenton?

BRUNO.

Junulara sekcio en Antverpeno

Je iniciato de S-ro Durwael, juna instruisto, membro de "La Verda Stelo", dekkvar gejunuloj, unuafoje, kunvenis merkredon, la 28an de februaro.

La celo de tiu unua kunveno estis kunigi la junajn geesperantistojn kaj, meze de amuzo, ekokazigi novan propagandon.

Dimanĉon, la 18an de marto, okazis, — denove ĉe S-ro Guido De Raedt, Waterbaan, 27 en Deurne, — dua tia kunsido, dum kiu estis ebleco por trinketi kaj danci... Kaj tiun ĉi fojon jam 19 gejunuloj ĉeestis.

Jen certe ĝojiga komenciĝo.

47-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Kopenhago, 4 - 11 Aŭgusto 1962

Sub la alta Protektado de la Dana Ĉefministro, Viggo Kampmann.

NOVA konstanta adreso:

ĉe U.E.A., Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

Dum la antaŭkongresa semajno (28/7 - 4/8 1962) okazos la Kvara Internacia Geografia Semajno en tipe dana popol-altlernejo: *Husmandsskolen* apud la urbo Odense, ĝuste en la centro de Dan. La gelernejestroj *Gronborg* bone scias Esperanton, kaj ilia tute moderna lernejo kun grandega parko prezentas tre taŭgajn eblecojn por studado, ripozo kaj gaja somerumado. Aparte oni povos studi danan agrikulturon kaj kooperadon, ĉar la lernejo posedas modelan bieneton.

Prelegoj okazos i.a. pri Balkana folkloro, Sociologaj fenomenoj en Bulgario, Afriko sub naciaj koloroj. Dano rigardas Ĉinion, Esperanto en geografia instruado, Fungo-narkotikoj. Filmoj kaj multaj kolorbildoj kompletigos la temojn. Vespere aperos "Parolata Geografia Revuo" pere de la partoprenantoj, de kiuj oni cetere akceptas aliajn popularajn preleg-proponojn, tiel ke la programo certe povos kontentigi ankaŭ nefakulojn.

Ekskursoj estos tra la dolĉa, fuena pejzaĝo al antikvaj memoroj (vikinga ŝipo en tomb-altaĵo), mezepokaj kasteloj, grandega ŝipfarejo k.a. — En Odense oni rigardos la naskiĝdomon kaj la muzeon de la plej fama dano: Hans Christian Andersen.

La prezo estos 15 d. kr. por plena gastigo en dultaj ĉambroj, ekskluzive ekskursoj. Ne-membroj de Internacia Geografia Asocio krompagu 5 d. kr.

Plurajn informojn kun aliĝilo petu — se eble aldonante respondokupono — ĉe la organizantoj: *Roma kaj Poul Thorsen, instruistoj pri geografio, Dyblandsvangens 7, Kopenhago, Brh.*

A.M. Gorkij — konvinkita adepto kaj amiko de esperanto — ne unufoje parolis profundsignife pri la internacia lingvo. Nun mi volas sciigi el miaj memoroj pri tre karakteriza epizodo, nenie menciita.

1920. Vintro. Komisiono sub prezido de Gorkij transprenas la domon de scienculoj — tiun saman konstruaĵon, kie ĝi ankaŭ nun troviĝas. Ni estas en la biblioteko de la palaco de grandduko Vladimir Aleksandroviĉ. Gorkij kiel ĉiuj, en pelto kaj gantoj (la palaco ne estas hejtita), trarigardas la librojn. Repliko de profesoro de Militmedicina Akademio N.A. Ivanov: En ĉiuj lingvoj estas skribitaj libroj; estus necese sciigi ĉiujn aŭ konstrui komunan, internacian, por ĉiuj kompreneblan lingvon. »

Gorkij akre alturnigante: «Tia lingvo ekzistas, profesoro — Esperanto. La scienculoj devas ĝin ekposedi kaj instrui ĝin al la popolo. Sed simpligi la ekzistantajn lingvojn estus sencele.»

Prof. J.I. Kanevskaja
el «Hungara Esperantisto» Nr. 6/50 junio.

Simpozio pri -ata/-ita

H.A. de Hoog; D.B. Gregor; K. KALOCSAY; S. La Colla; I. Lapenna; T. Nakamura; T. Pumpr; J. Regulo; R. Schwartz; H. Sonnenfeld; G. Waringhien: «La Zamenhofa Esperanto» (Simpozio pri -ata/-ita). Eldonis «Stafeto» de Prof. Dr. J. Regulo Perez en La Laguna, Kanariaj Insuloj (VIII + 330 paĝoj — Prezo: 3 USA Dol.)

Dum atendo je pli profunda recenzo

Dro J. Roose

Tuj kiam la homo eniras tiun stadion de sia historio kiun oni povas nomi civiliza li estas devigata lerni lingvon, sian gepatran. Ni scias ke imperiestro Karlo la Granda ĉirkaŭ la jaro 800 verkigis gramatikon de la lingvo Franka. «Gramarië es deerste saecke» («gramatiko estas la unua tasko») poeziverkas la 14-jarcenta Boendale en sia «Lekenspieghel» (=«Spegulo de la laikulo» t.e. de la ordinara meza homo). Ĉar la unuaj kreintoj de la lingvoj faris tion komplete nature kaj spontane, ili ne pensis pri reguloj nek pri ia ordo, tiel ke la postaj kodifikintoj de tiuj lingvoj devis allasi multegajn esceptojn al la reguloj. Tuj kiam la homoj venis en kontakto kun personoj de aliaj lingvogrupoj, ili devis lerni unu aŭ plurajn fremdajn lingvojn pli malpli profunde. La studado de lingvoj estas certe menso-eduka. Tamen ne ĉio en la lingvistado estas tia. La enkapigo de vortoj ekzemple estas mortiga por la memoro dum ke ĝi ne profitas al la menso. Multaj reguloj ankaŭ ne. La ĝusta skribado same. La dirmanieroj estas ofte tiaj; la vortordo ankaŭ ofte; la tempoj de la verbo povas ankaŭ esti vere instruaj. Pri tio i.a. Nietzsche atentigis kiam li skribis: «Lerni multajn lingvojn plenigas la spiriton per vortoj anstataŭ per faktoj kaj pensoj dum ke la spirito tamen povas preni kaj teni nur limigitan amason da enhavo. Tiel la lernado de lingvoj malutilas en tiu senco ke ĝi donas la iluzion ke oni akiris lertecon. Malrekte ĝi malutilas ankaŭ en tiu senco ke ĝi kontraŭas la akiron de profundaj konoj». Malgraŭ ĉio ĉi ni povas aserti ke estas tre profite al la menso studi lingvojn, plej eble multajn. Sed ne nur la lingvistado estas eduka por la menso. Ankoraŭ aliaj studoj estas multe pli instruaj: natursciencoj, matematikoj, precipe filozofio. Tiel ke ni devas limigi l'astudon de lingvoj je tio kio estas fakte instrua, kun forigo de ĉio alia kio fakte estas por la menso kaj la memoro nur balasto. Sed nun venas alia postulo de la vivo, tiu de la praktikaj ebleco kaj neceseco. Praktike estas ofte necese studi alian lingvon, ankaŭ kun ĝia balasto, ĉar oni devas estri tiun lingvon por veni en komercaj, turistaj aŭ aliaj rilatoj. Alia postulo de la vivo estas ke oni devas proprigi al si la scion de multaj faktoj, metodoj ktp. (instruaj aŭ ne) pro tio ke oni devas havi okupon kiu permesas gajni monon. Dum la juneco oni donas al la geknaboj iom de ĉiuj sciencoj ĉar oni ne ankoraŭ scias en kiu direkto ili iros. Poste, kiam oni jes scias, oni ankoraŭ instruas multajn fakojn por doni «ĝeneralan, universalan kulturon». Sed la aktivecoj de la homoj iĝis tiel diversaj, la specialist-sciencoj tiel multaj kaj variaj, kaj sekve la instruprogramoj tiel plensarĝitaj kaj plenŝtopitaj ke la instru-direktoroj bonege konscias la devon forhaki plej eble multe da ne-strikte bezonataj aĵoj. Tio faris ke en kelkaj landoj oni malpliigis la studon de la klasikaj lingvoj Latina kaj



HET WELGEKENDE
MAGAZIIN VOOR MODERNE HERENKLEDING

in't duifken

GROTE KEUS
IN GEREDE KLEDING.

KOSTUMEN - SPORTJASSEN - BROEKEN
UNIFORMEN - GABARDINEN - LODENS
STIJLVOL MAATWERK

KOEPOORTSTRAAT 64-66, ANTWERPEN

RABATO POR ESPERANTISTOJ

Greka. Tio estas racia. Cetere oni volas pli kaj pli raciigi ĉion. Tiu ĝenerala tendenco havas en kelkaj landoj la sekvon ke lingvistoj plisimpligas la propran lingvon forigante ekz. nenecesajn kazojn (ofte la akuzativo en la Nederlanda lingvo), reformante la skribmanieron de multaj vortoj. En landoj kie la vort-, ide- aŭ skribsistemo estas terurc komplikaj, oni tutsimple forjetas la sistemon por allasi fremdan sed simplan sistemon (Ĉinujo kaj Arabujo). Generale estas ankoraŭ konstatebla ke la plej multaj popoloj penegas kaj penadas dum jaroj en la studado de la propra lingvo kaj ke fine ili ankoraŭ skribas kaj parolas ĝin kun multaj eraroj. Tio estas ne-racia, kontraŭ la logiko, kontraŭ la homa digno, kontraŭ la postuloj de la nuna praktika vivo. Sed ni povas esperi ke tiu malbelajo iom post iom malaperos sekve de la instruado de pli kaj pli multaj popoltavoloj kaj sekve de la raciigo, t.o. plisimpligo de la lingvoj. Ankoraŭ ĉiam la sama raciiga tendenco rezultigas ke pli kaj pli da homoj, vidante la kreskantajn interpopolajn rilatojn, kaj do la faktan unuigon de la homaro, konscias ankaŭ kia sensenca barego estas la tiel granda lingva diverseco. De tie la konkludo ke devas ekzisti unu, por ĉiuj sama, dua «help»-lingvo. Preskaŭ ĉiu estas konvinkita pri tio. Nur la demando «kiu lingvo estu tiu dua?» estas tre diverse respondata. Multegaj ankoraŭ pensas ke unu nacia lingvo (tiam la plej disvastigita) estus la ideala solvo. Ni kredas, pro motivoj kaj argumentoj kiujn ni ne devas pritrakti tie-ĉi, ke nur Esperanto povas esti tiu solvo. Longtempe antaŭ la ekesto de esperanto, jam ek de la 16a jarcento, pluraj filozofoj, kiel ekz. Descartes, fiksas la principojn laŭ kiuj la nova helpilingvo devus esti formata. Post tre multaj provoj kiuj fiaskis, venis Esperanto kiu, en iu senco jam venkis, kaj ankoraŭ nun daŭrigas sian malrapidan sed daŭran venkan marŝon tra la mondo. Se Esperanto venis al la stadio en kiu ĝi nun estas, tio verŝajne estas la sekvo de jenaj faktoroj: 1) la reaja bezono de mondhelpilingvo 2) ĝia vera facileco 3) la idealista faktoro kiu animis tre multajn pionirojn 4) la tuja praktikado kaj la literaturo. Esperanto estas efektive facila... relative. Ĉiukaze pli facila ol kiu ajn nacia lingvo; pro ĝiaj sistemejo, planeco, logiko. Perfekta? Kio estas perfekta? Tamen ne multaj, precipe teoriecma intelektuloj kredis necesa reformi ĝin, plibonigi (!) ĝin... kaj ili kaŭzis skismon. La «praktika sento» de aliaj sentigis ilin ke devis ekzisti finfine definitiva formo; kiu aperis sub la formo de la «Fundamento». La posta historio pruvis ke la reformemuloj malpravus kaj malvenkis. Jes, esperanto estas facila. Ni tamen ne fermu niajn okulojn antaŭ kelkaj evidentaj aĵoj.

Unu tia evidentaĵo estas ke la plimulto de la esperantistoj faras multajn erarojn en la skribado kaj parolado de sia lingvo. Se oni pripensas ke esperanto estas facila lingvo kaj aliflanke ke la esperantistoj estas plejparte mezkleraj homoj, tiam oni devas konfesi ke kuŝas en tiu fakto io nenormala. Oni ne argumentu ke la sama okazas en la naciaj lingvoj. Ankaŭ tio estas nenormala... kio antaŭvideble malaperos post iom da tempo, kiel ni supre konsideris. Ekzemple: erarigoj kontraŭ la akuzativo. Per tio ni ne volas diri ke la akuzativo estas forigenda. Antaŭprovoj de Esperanto ne havis la akuzativon (G. Waringhien: «Lingvo kaj Vivo» eld. «Stafeto» en 1959; paĝoj 31, 38 kaj 41). Zamenhof poste enkon-

dukis ĝin. Ĝi estas efektive necesa. Sed mi kredas ke la multaj eraroj kontraŭ ĝi trovas sian kaŭzon en la fakto ke multaj verkistoj uzas ĝin tie kie vere ne necesas; tiel agante kontraŭ Zamenhofa admono en «Lingvaj Respondoj», 2a eldono en Parizo, E.C.I. paĝo 40. Ni citas nur unu ekzemplon: «ĉesigu la atakojn kontraŭ la zamenhofan esperanton» («La Zamenhofa Esperanto» p. 74). La sekvo estas ke multaj adeptoj uzas ĝin tie kie ne povas! Do, la kaŭzo de multaj eraroj estas tie-ĉi ne la strukturo de la lingvo sed la malbona uzo de parto de ĝiaj gvidantoj. Aliflanke la erara uzo povas ankaŭ fontiri en la strukturo de la lingvo mem. Ni prikonsideru la uzon de «sia». Ankaŭ spertaj esperantistoj faros ankoraŭ erarojn kiam la frazoj estas iom komplikaj. La reguloj pri la uzo de «sia» ni devas dedukti el la fundamenta ekzercaro, ĉar la fundamenta gramatiko ne sufiĉe klarigas ĝin. Nu, atenta legado de tiu ekzercaro rivelas mallogikecon, kaj precipe komplikecon. Kiam venos la de la fundamento antaŭviditaj cirkonstancoj en kiuj estos ebleco ŝanĝi la gramatikon, ni esperas ke la rajtigita instanco ŝanĝos tiun parton kiu tamen estas grava.

Alia malfacilaĵo estas nun la uzo de -ata/-ita. Dum jardekoj la esperantistaro ne sciis pri malfacilaĵo tiurilate. Legu pri tio «La Zamenhofa Lingvo» p. 296. Preskaŭ ĉiuj okcident-europanoj malbone komprenis Zamenhof en tiu punkto. Ĉiuj kredis ke ekzistas pluskvamperfekto en Esperanto kaj nun ni venas al la konstato ke tiu tempoformo ne ekzistas (o.c.p. 282)! La vera signifo de estis -ita ne plu estas «antaŭtempoco» kiel ni ĉiuj kredis, sed jes «preteco» (o.c.p. 21). En la kroniko: «Lernu per la eraroj» «La Praktiko» fakte transformis ĝustajn formojn en eraroj. Sajnas ke Dr. I. Lapenna jam pli ol tridek jarojn konscias tion, sed silentis... (o.c.p. 74) Konante la personecon de Dr. Lapenna, ni miregas! Kiam ano de unu de la Slavaj lingvoj legas frazon kun «estis -ata», ĉajnas ke li komprenas ĝin tiel ke la ago ankoraŭ ĉiam estas daŭra aŭ daŭrigata. Laŭ tiu aspekto de daŭro kaj de ne-finiteco de la ago oni nomas tiujn volas konservi tion en la E-lingvo la «aspektuloj». Oni ne dubu pri tio ke Zamenhof mem, ankaŭ en la fundamento, komprenis la pasivon tiel. Ni mem antaŭe erare pensis la kontraŭon. Sed la ekzemploj el la fundamenta ekzercaro kiujn St. La Colla citas en «La Zamenhofa Esperanto» p. 33 klare montras tion. Ankoraŭ estas beno ke Zamenhof ne enkondukis ankaŭ la aspekton de distanco! Sajnas ke en kelkaj orientaj lingvoj ekzistas apartaj tempoformoj por la distancoj inter parolanto kaj parolato! Imagu ke Zamenhof estus enkondukinta tion!

Sen ia ajn dubo la enkonduko de «aspektuloj» en lingvo estas grava malfacilaĵo de ĝi. Kaj pensi ke estus tiel facile forigi tiun malfacilon! Tutsimple estus: «estis -ita estas la pluskvamperfekto (= la ago efektiviĝis pli frue ol la momento pri kiu oni parolas); kaj estis -ata signifas ke la ago estas en «efektiviĝo ĝis finiĝo» rilate al la tempo pri kiu oni parolas. Kaj la Slavoj nur devus fari la malgrandan penon forigi el sia pensado tiun ideon de daŭro. Kaj nun grava punkto. Kial ni rajtas diri ke «estis -ata» signifas ke la ago estas en «efektiviĝo ĝis finiĝo» rilate al la tempo pri kiu oni parolas? Car tio estas en la senco de la vortoj mem! Kiam oni skribas ke la 10an de januaro iu estis murdata, tio signifas ke efektive la 10an de januaro tiu persono mortis sekve de mortigo. Alie la vortoj ne plu havas senco. Efektive se li ne mortis oni ne rajtas paroli pri murdo. Tiam estis murdprovo. Ankaŭ en la juro

oni distingas inter murdo kaj murdprovo. Se la krimulo faris la agon la 10an kaj se la viktimo mortis la 11an de jan. tiam oni parolas pri atenco. Estas tial ke la ekzemplo kiu donas R. Schwartz (kies paĝo 269 en «La Zamenhofa Esperanto» estas egale modelo de brila stilo, sed ankaŭ modelo de sofista rezonado) sur paĝo 281 «Hundo renversis nin kaj ĝi tamen ne renversis nin» (alia homo tenis la falanton) estas erara. La hundo puŝis lin; kaj nur se la surterigo okazis oni rajtas paroli pri renverso. Tial estas same eraraj la ekzemploj kiujn donas Dr. I. Lapenna (o.c.p. 64). Rilate al tiuj akcioj (p. 60); aŭ ili estis vendataj aŭ nur «vende proponataj»; poste eble oni diru «vendataj».

Pro tiu ne-kompreno de la vortoj kaj pro tiu aspekto de daŭro, la aspektuloj venas al mokridindaj konstatoj aŭ konkludoj. Kiam Prof. G. Waringhien legas: iu estis renversata de aŭtomobilo, li plukomunikas aŭ komentarias ke tiu aŭtomobilo post la renverso, revenis kaj duafoje renversis la malfeliĉulon kaj ĉe triafoje, kaj tiel daŭre ĝis... jes verŝajne per omnia saecula saeculorum! («Lingvo kaj Vivo» eld. «Stafeto» 1959 p. 190). Verŝajne, same, se oni ekscias ke iu estis naskata en la jaro 1364, oni devas fari la demandon: ĉu hodiaŭ jam okazis la naskiĝo?! Prof. Lapenna dirus: «Kun la escepto de frenculoj — mi ripetas: kun escepto de frenculoj — neniu komprenos ke la naskiĝo eble devas ankoraŭ okazi kaj ke la aŭtomobilo ankoraŭ ĉiam estas ree ree renversanta la viktimon». (Mi parafrizas frazon de I.L. en «La Zamenhofa Esperanto» p. 69)

Se nun ankoraŭ iu dubas ĉu la aspektoj estas grava malfacilaĵo de la verbo en Esperanto, tiu legu en «Lingvo kaj Vivo» de G. Waringhien kiamaniere li devas ĝuste instrui ĝin. (194-5). Mi devas sincere diri ke mi gratis malantaŭ la oreloj kiam mi legis tion. Ĝis nun mi ĉiam prudente diris al la gekursanoj, por ne malkuraĝigi ilin, ke la gramatiko estas relative facila, kun kelkaj esceptoj! Helpezone mi ĉirkaŭrigardas esperante ekvidi la personon kiu tiros min el tiu nova embaraso. Car, sincere, mi havas la emon rifuzi tiel instrui la verbon. Sed mi konfesu ke vere Zamenhof uzis la pasivon en la por ni malfacile akceptebla maniero. Kaj tie-ĉi mi tute aprobas kion skribas G.W. sur paĝo 297 «Kiam, en la Plena Gramatiko, K. kaj mi prenis la decidon konsili la geografian sufikson -io, ni neniel penis kaŝi ke tiu pozicio estas kontraŭa al tiu de Zamenhof kaj de la lingva komitato. Kial niaj disopiniantoj ne faras same pri la pasivaj participoj?

Post konsiderado de ĉio, restas ke la Fundamento estas kontraŭ nia tezo. Ĉu do solvo ekzistas? Mi pensas jes kvankam mi ne ankoraŭ trovis la solvon. Mi kredas ke mi trovis la vojon al la solvo... en la Fundamento!! En la antaŭparolo de la 7a eldono (E.C.I. Paris 1928) mi legas sur p. X: "2) Se ia aŭtoritata centra institucio trovos ke tiu aŭ alia vorto aŭ regulo en nia lingvo estas tro neoportuna, ĝi ne devos forigi aŭ ŝanĝi la diritan formon, sed ĝi povos proponi formon novan, kiun ĝi rekomendos uzadi paralele kun la formo malnova.»

Estas verŝajne pro tiu permeso ke nun, konstatante ke la prepozicio «de» havas du signifojn, oni pli kaj pli uzas la novan «far» anstataŭ la dua signifo de «de».

Nun mivenas al lasta punkto. La «aspektuloj» aŭ «itistoj» diras ke estas grandega danĝero se oni ne uzas esperanton kiel Zamenhof uzis ĝin. Mi ne kredas tion. Kontraŭe, mi konstatas ke neniu ankoraŭ skribas aŭ parolas kiel Z. faris, kaj la liatempuloj. Esperanto konas iun evoluon en tiu senco ke envenas novaj vortoj, ke kelkajn sufiksojn oni malpli uzas, kaj similaj aferoj. Tiu evoluo ne estas tia ke la lingvo ŝanĝiĝis. Tial oni ankoraŭ nun egale bone komprenas la Zamenhofan esperanton kaj ĉiam bone komprenos ĝin. Esperanto ne iĝus fremda aŭ alia lingvo se oni allasus la -atsistemon flanke de la -itsistemo. Ĉu ne post? da tempo la (general) uzo sankeius iun regulon? Memoru bone ke ekzistas nun granda konfuziĝo ĉe tiuj kiuj legis la multajn kampanjo-artikolojn rilate al -ata, -ita. Multaj ofte ne scias kiel konjugacii. Se, depost nun oni instruos la verbon kiel diri en «Lingvo kaj Vivo», restos la ofta erara uzado, kiel en la kazo de la akuzativo. Kaj en tio kuŝas granda danĝero: ke fine Esperanto ne plu estos la racia kaj facila mondhelpingvo kiun la homaro bezonas kaj kiu devus esti la normala rezulto de la hodiaŭa en ĉio manifestiĝanta raciigo.

G. FAES
Eiermarkt, 21
ANTVERPENO
★ Por via MUZIKO
RADIO kaj GRAMOFONO

LES ENTREPRISES
DERKS
226, Rogierstrato, BRUSELO
Tel.: 15.19.92
Entrepreno de
KONSTRUAĴOJ

GRUPA VIVADO

Honora distingo por nia Prezidanto

Plaĉis al la Reĝo, honorigi nian Prezidanton, S-ron Maurice Jaumotte, nomante lin Oficiro en la Ordeno de Leopoldo la II. pro liaj meritoj sur la ĵurnalista kampo.

Ni prezentas niajn plej koraj gratulojn al la honorigito.

Feliĉo kaj malsano por nia Kasistino S-ino Van Herck

En la monato de januaro, ni ricevis la feliĉigan novaĵon pri la naskiĝo de filineto ĉe G-roj Van Herck-Huysmans.

Baldaŭ post la naskiĝo, ni eksciis ke S-ino Van Herck, nia sindonema kasistino, devis eniri klinikon pro postnaskaj sekvoj.

Ni esperas ke, kiam ŝi legos tiujn liniojn, ŝi estos ree hejme kaj ke ŝi povos ricevi samtempe la rediron de niaj gratuloj kaj de niaj bondezirej por baldaŭ-estonta, plena resaniĝo.

ANTVERPENO

Esperanto-Grupo « La Verda Stelo »
Poŝtĉeknumero: 726.54

La 5an de januaro S-ro F. Schellekens enkondukis la novan jaron per tre interesa programo: « Rerigardo sur la pasinta jaro ». Li uzis plej modernajn rimedojn por tion akiri: lumbild- kaj filmaparatojn, diapozitivajn kaj magnetofonon. La sukceso estis kompleta kaj li plene meritis la laŭdon de la Prezidanto S-ro Maur. Jaumotte. Kunlaboris: F-inoj L. De Winter kaj A. Enzlin, S-ino L. Merckx kaj S-ro J. Montmirail. Krome S-ro L. Durwael raportis pri la « Seminario de la Junularo » kiu okazis en Kolonjo kaj kiun li ĉeestis.

La 12an dum la ĝenerala jarkunsido S-roj J. Verstraeten kaj R. Balleux (sekretario kaj kasisto) prezentis siajn raportojn kaj la Prez. S-ro Maur. Jaumotte disdonis medalojn « Pro fideleco » al S-ro H. Jacques, S-ino Ph. Mortelmans, S-ino R. Van Eynde, F-ino E. Van der Weken kaj S-ro K. Van Gompel. Ĉiuj tiuj membroj aliĝis antaŭ 10 jaroj. Pro 30jara membreco S-ro H. De Hondt ricevis arĝentan steleton sur sia arĝenta medalo kaj S-ino L. Merckx kaj D-ro Christiaens akiris oran steleton sur la arĝenta medalo pro 35jara membreco. Post tre varmaj kaj laŭdaj vortoj de la Prezidanto al siaj kunlaborantoj de la tuta jaro, S-ro Luc De Marré, kiel vic-prezidanto, honorigis S-ron Jaumotte pro lia 35jara seninterrompa prezidanteco. Bela donaco estis transdonata al li same kiel bela florgarbo al S-ino Jaumotte. La vespero finiĝis en tre festa atmosfero.

Dimanĉon, la 14an en la salonoj Magnus 54 personoj partoprenis al bankedo je la honoro de S-ro H. Sielens, eksiganta vic-prezidanto. S-ro Maur. Jaumotte humorplene faris la festparoladon pro kiu la festito kortuŝe dankis tamen ege sprite ankaŭ por la bela donaco, kaj por la floroj senditaj al S-ino Sielens. S-ro R. Jacobs, nome de la Brusela grupo, S-ro H. Vermuyten, kiel bona amiko, per bela poeziaĵo kaj S-ro G.C. Fighiera, nome de sia edzino nova redaktorino de Heroldo de Esperanto, kaj el propra nomo, siavice gratulis kaj dankis S-ron Sielens. S-ro J. Verstraeten toastis je la sinjorinoj kaj fraŭlinoj kaj bela florbukedo estis transdonata al S-ino Jaumotte.

La 19an S-ino G. Debacker agrable paroladis pri la bela lando « Jugoslavujo ». Multaj lumbildoj estis prezentataj kaj pere de bela ekspozicio la paroladistino

montris amason da objektoj, memorajoj, donacoj kaj specialaĵoj el tiu sunplena kaj gastama lando.

La 26an el la manoj de la Prezidanto S-ro Maur. Jaumotte 8 gelnintoj de la lasta elementa kurso ricevis diplomon. Estis S-ro kaj S-ino . Callens, S-ro H. Cools, S-ro E. Lernout, F-ino A. Michiels, S-ro W. Michiels, S-ro J. Monstrey kaj S-ro Peeters C. Post kuraĝiga kaj solena alparolo de la Prezidanto, S-ino M. Callens, nome de la gelnintoj, esprimis en tre flua kaj bela Esperanto sian dankon al la profesoro S-ro H. De Roover kaj substrekis tion per bela donaco. Tiu ĉi lasta reparolis kaj dankis laŭ sprita kaj amika maniero. Dum la dua parto de la vespero S-ino Frieda De Roover (lernintino de la antaŭlasta kurso) detale raportis pri sia vojaĝo al kaj en Jugoslavujo. Ŝi montris belegajn kolorigitajn diapozitivajn kaj vere sukcesis kapti la atenton de la ĉeestantaro dum tuta horo. F-ino A. Enzlin kompletigis la programon per memverkita filmo pri Jugoslavujo kaj per la aŭdigo de popolokantoj kaj folkloro muziko el tiu lando.

La 2an de februaro S-ro R. Van Eynde prezentis dokumentajn, kolorigitajn sonfilmojn pri Sud-Afriko, Norvegujo, parto el muzikfilmo pri la 5a simfonio de Beethoven kaj krome esperantigitan filmon pri « Belaj koloroj — Bona humoro ». Estas la historio de l' kolorigado de teksaĵoj.

La 9an S-ino R. Lecat paroladis pri « Hispanujo » prezentante grandan nombron da lumbildoj. Dum sia vojaĝo ŝi atencplene observis ne nur la multajn vidindaĵojn sed ankaŭ la vivon de la nunaj hispanoj. Tio ebligis al ŝi fari objektivajn konkludojn. La tuto estis prezentata en bonega Esperanto kaj pere de la brustmikrofono la grupa teĥnikistaro garantiis ĝueblan aŭskultadon.

La 16an S-ro J. Verstraeten prizorgis la reaŭdigon de la solenaĵoj de antaŭ 5 jaroj kiam la grupo festis sian 50 jaran ekzistadon kaj la 30 jaran prezidanteco de S-ro Maur. Jaumotte.

La 23an la ĉeestantoj sidis « Ĉirkaŭ la Fajro », rubriko al kiu ĉiu povas kunlabori per kiu ajn verko, teksto aŭ legaĵo. Partoprenis al tiu programo: S-ro H. De Roover per propra verko tradukita el la flandra (amuza fantaziaĵo), S-ro H. Vermuyten per diversaj deklamajoj el nova aperinta libro, S-ino R. Lecat per tre amuza kaj de la publiko tre ŝatata geedza historieto, S-ro E. Claes (lerninto de la antaŭlasta kurso) per memverkita teksto en kiu li denove montris sian progreson en Esperanto, S-ino G. Debacker per amuza skizo pri okazintaĵo el la historio de Parizo kaj S-roj L. De Marré kaj J. Verstraeten kiuj prelegis el diversaj libroj.

La grupaj kunsidoj okazas ĉiuvenrede je la 20,15a h. en hotelo « De Witte Leeuw », Frankrijklei, 4 Antverpeno. (la etaĝo).

Familia Vivo

Naskiĝo

En la daŭro de kelkaj tagoj, du el niaj amikaj paroj estis feliĉigataj per la naskiĝo de dua infaneto: de Katrientje, ĉe D-ro kaj S-ino Peeters-De Ketelaere, kaj de Nadine, ĉe G-roj Aertssens-Cools, gebofratoj de G-roj De Marré.

Al la feliĉaj gepatroj, al la geavoj kaj geonkloj, — ankaŭ membroj de la Grupo, — ni prezentas niajn plej korajn gratulojn.

Honorigo

S-ro Remy Van Eynde, inspektoro de la laboro, akiris la titolon de Oficiro en la Kronorden.

Okaze de tiu alta distingo, ni prezentas al la fidela komitatano de la grupo, kiu ankaŭ laboras sur aliaj kampoj de nia movado, niajn plej sincerajn gratulojn.

Funebro

Kiel fulmotondro, venis la novaĵo pri la tute subita morto, en amika domo kie ŝi vespermanĝis, de F-ino Marcelle Moriamé, unu el la plej fidelaj membrinoj de la Grupo, kiu, de post la milito, vizitis multajn universalajn, naciajn kaj bene-luksajn kongresojn.

Dudeko da Verdstelanoj ĉeestis la enterigan ceremonion.

Ni prezentas al ŝia frato kaj familianoj la esprimon de la granda bedaŭro, kiu estas tiu de ĉiuj membroj de la Grupo.

BRUGO

Bruga Grupo Esperantista - Reĝa Societo

(Poŝtekkonto: N° 4835.33)

Kiel kutime, la unua horo de ĉiu marda kunveno estis dediĉata al leciono de la elementa kurso, sub gvidado de Sro. J. Eneman, profesia instruisto. Dum la dua horo okazis diversaj programeroj, el kiuj la ĉefaj estis:

La 21an de novembro F-inoj Is. Van Parys kaj Y. Poupeye, interesa parolado kun kolorlumbildoj pri Lugano kaj ĉirkaŭaĵoj.

Publika vendado (aŭkcio) de esperantaj libroj, duoblaĵoj el la grupa biblioteko, la 28an de novembro. Multaj membroj faris interesajn okazaĵetojn.

Sta. Nikolao estis festata la 5an de decembro. Ĉiuj ĉeestantoj alportis nekonatan premion, kies dislotado kaj ofte laboriga elvolvado tre gajigis la kunvenon.

Jaŭdon 14an de decembro, en Middenstandshuis, okazis eksterordinara kunveno, komuna por ambaŭ Bruĝaj grupoj, memore al la naskiĝotago de D-ro. Zamenhof, kies vivo kaj verko estis detale elvokataj de Sro. Ch. Poupeye. Poste sekvis agrablaj konkursludoj.

La 19an de decembro okazis parolata gazeto, kun kontribuoj de F-ino. M. Willems, pri « Centjara datreveno de la maĝumo en Usono » kaj de Sro Ch. Poupeye, kiu parolis pri UEA kaj ĝiaj servoj, rekomendante individuan membriĝon.

Kaj por ĝoje fini la jaron, la plej fidelaj gemembroj kunvenis la 28an de decembro en « Hotel de Londres », kie post bonega vespermanĝo, ili amuziĝis en amika kunesto.

Jam la 2an de januaro, la grupo reprenis siajn kutimajn mardajn kunvenojn. Sro. Ch. Poupeye antaŭlegis kaj komentariis artikolon « Kion kredis Zamenhof? »

La kunveno de la 9a de januaro estis agrabligata per deĉifrado de sekreta skribajo.

Leciono de la elementa kurso, sub gvidado de Sro. J. Eneman, estis donata la 16an de januaro, post kio F-ino. Y. Poupeye gvidis interesan konkursludon.

Komitata kunveno okazis jaŭdon 18an de januaro.

La ĝenerala jarkunsido okazis la 23an de januaro. Post la kutimaj raportoj de la prezidanto, de la sekretariino kaj de la kasisto, la kunveno elektis la komitaton, kiu aspektas nun jene: Prez.: Sro. Ch. Poupeye; Vicprez.: S-ino S. Verbeke-Vanden Berghe; Vicprez.-Kasisto: Sro. D. Demeulenaere; Sekretariino: F-ino. Is. Van Parys; Bibliotekistino: F-ino. M. Willems; Gekonsilantoj: F-ino. Yol. Van Parys kaj S-roj. U. Soen, J. Eneman kaj G. Meganck. Estis nomata honora vicprezidentino: F-ino. A. Boereboom.

La 30an de januaro, post parolado de S-ro. Ch. Poupeye, pri « Aŭdaj kaj vidaj instrumentoj », okazis debato pri la temo « Kongreso aŭ semajnfina renkontiĝo ».

Plia komitata kunveno okazis jaŭdon 1an de februaro.

La 6an de februaro, F-inoj Yol. kaj Chr. Van Parys interese paroladis pri « Menton kaj la Lazura marbodo » kun projekciado de belegaj kolorlumbildoj.

Interesa konkursludado, sub gvidado de Sro. D. Demeulenaere.

S-ino. S. Verbeke-Vanden Berghe faris la 27an de februaro tre interesan paroladon pri « Rondvojaĝo tra Nederlando ». Tiu parolado estos daŭrigata la 13an de marto.

Programo por venontaj kunsidoj:

Ciumarde, en Strijdershuis, Hallestraat (Tel. N° 347.98):

je la 20a: leciono de la elementa kurso, sub gvidado de S-ro. J. Eneman;

je la 21a: Ordinara kunveno laŭ jena programo:

MARO: 6an: Karnavala rendevuo. 13-an: Dua parto de la parolado de S-ino. S. Verbeke-Vanden Berghe, pri « Rondvojaĝo tra Nederlando. 20an: Konkursoj sub gvidado de F-ino. Y. Poupeye. 27an: Magnetofona kant- kaj deklamvespero sub gvidado de F-ino. Chr. Van Parys.

APRILIO: 3an: Tra la mondo per kolordiapozitivaj: F-ino. Y. Poupeye. 10an: Komuna legado de Esp. revuoj. 17an: Filmprezentado. S-ro. G. Meganck. 24an: Lingvoj ludoj, S-ro. J. Eneman.

Multaj tekstoj jam ensenditaj komence de marto aperos en la aprila numero kiu tuj sekvos post la nuna. Tekstoj por la majo-junio numero estu ensendataj plej laste la 10.4.62!

se vi parolas pri STROVI... vi pensas pri
viandaĵejo. se vi pensas pri viandaĵejo... vi
aĉetas ĉe

STROVI

Vlamingstraat, 48 BRUGGE

STROVI - Varoj:

GARANTIO pri

bona kvalito

kaj bona prizorgado

Telefono: pogranda komerco 34559

detala " 33408

STROVI estas unuaranga!



- ★ POR VIAJ EKSTERLANDAJ
TRANSPAGOJ
- ★ POR ŜANĜOJ EN LA PLEJ ALTA
KURZO
- ★ POR VOJAĜDEVIZOJ

Bank van Roeselare & Westvlaanderen

Sidejo: ROESELARE

Noordstraat, 38 Belgujo

38 Agentejoj kaj oficejoj en la tuta provinco de Okcidentflandrujo.

manufakturaĵo firma DE BROUWERE

Magdalenastraat, 29, Kortrijk (Belgujo) - Tel. (056) 216.54



VIRINAJ BLUZOJ KAJ JUPOJ " MAGDELEINE "

deponita kvalitmarko
la perfekta konfekcio
fabrikita el plej bonaj svisaj teksaĵoj
Haveblaj en la bonaj konfekcibutikoj



PRECIPAJ CENTROJ:

Antwerpen	: Aalmoezenierstr. 2 Abdijstr. 57 Anselmostr. 17 Nationalestr. 87
Arlon	: Marché-aux-Légumes 16
Brugge	: Breidelstr. 8
Brussel	: Galerie d'Ixelles 9 Anspachlaan 194
Eupen	: Kirchstr. 14
Gent	: Brabantdam 25
Herstal	: Rue Large Vote 4
Leuven	: Bondgenotenlaan 29
Luxembourg	: Place de la Gare 67
Mechelen	: Grootbrug 8
Roeselare	: Ooststr. 124
Tournai	: Rue Royale 75
Turnhout	: Herentalsstr. 6
Verviers	: Pont St. Laurent 2